


PER UNU ŜLOSILO



VI MALFERMOS ĈIUJN BUŜOJN



JAROJ de LIBERO kaj PACO

En la jaro 1945 estis venkita la faŝisma Germanio kaj la militarisma Japanio kaj per tio finiĝis la dua mondmilito. Tiu fakto rezultigis novan proporcion inter la socialismo kaj la kapitalismo.

Ekde fino de la 1944-a jaro la batalfronto antaŭeniĝis sur la teritorio de Ĉeĥoslovakio kaj progresis de la orienta Slovakio tra Moravio al Bohemio. La 5-an de majo 1945 eksplodis en Prago popola revolucio kaj kvar tagojn poste - la 9-an de majo 1945 Prago estis liberigita per rapida operaco de Ruĝa armeo. Fine la 11-an de majo estis frakasitaj la lastaj grupoj de la faŝista armeo kaj Ĉeĥoslovakio fariĝis denove libera. Ni neniam forgesos, ke sur nia teritorio perdis siajn vivojn 140 000 sovetiaj soldatoj.

La 9-a de majo - la tago de liberigo de Prago - fariĝis nia nacia festotago. Ĝi estas la plej grava dato de nia historio. En majo 1945 nia lando kaj popolo estis savitaj antaŭ kompleta likvido. Antaŭ ni malfermiĝis nova vojo al pli bona kaj pli feliĉa estonteco, al la nova kaj justa sociordo.

En februaro 1948 la laborista klaso kune kun la ceteraj laborantaj tavoloj venkis la burĝaron kaj komencis la socialisman rekonstruon de la socio. La popolo fariĝis la vera mastro en sia lando. Definitive estis likvidita la ekspluatado de homo fare de homo, estis sekurigita la demokratiaj rajtoj kaj sociaj sekurecoj de la laboruloj, la egaleco de la nacioj kaj naciminoritatoj vivantaj en nia lando. Dum nuraj kvar jardekoj okazis profundaj ŝanĝoj en la nacia ekonomio, abrupta disvolviĝo de la industria produktado, socialisma alikonstruo de la agrikulturo, intensa kresko de la vivnivelo, kultureco kaj edukiteco de la popolo, sekurigo de la paca vivo surbaze de la firma amikeco, alianco kaj ĉiufanka kunlaboro kun Sovet-unio kaj la pluaĵ socialismaj landoj.

La ĉi-jaraj solenaĵoj de la 40-a datreveno de la venko super la faŝismo kaj liberigo de nia lando samtempe instigas nin al plua efika laboro por pli bona estonteco de ni kaj de niaj infanoj, al plua batalado kontraŭ ĉiuj formoj de faŝismo, rasismo kaj maljusteco, por la eterna paco sur la tero.

- red -

FESTOTAGAJ PROMENOJ TRA GALERIOJ

Malavare regalis nin dum la Kristnaskaj kaj Novjaraj festotagoj la Nacia Galerio en Prago. Krom siaj daŭraj, mondkonataj ekspozicioj, surprizis nin per kelkaj tre allogaj porokazaj aranĝoj.

Multaj praganoj akceptis la proponon ĝui la nekutimajn artajn travivaĵojn, tial ŝajnis, ke ĉiuj veturas direkte al la Praga Burgo. Multaj eltramiĝis unu stacion pli frue kaj eniris la ĉarman Regan Kasteleton "Belvedere", situantan en ĝardeno, kiu mem impresas artdeŝnaĵe. En la kasteleto oni ekspozicias bildojn de Otakar Kubín - Ĉoubine /la francan formon de la nomo de majstro kaulis lia longjara restado en Francio kaj post la reveno hejmen li ne plu ŝanĝis tion/, ĉeĥa Merita Artisto, kiu akiris admiron de la tuta mondo kaj kies centa naskiĝdatreveno /1883/ troviĝas sur la listo de UNESCO.

La impona nombro de 233 rigardeblaj bildoj, havaĵo de diversaj ĉefurbaj galerioj, sed ankaŭ de multaj privataj posedantoj, instigas imagi, ke la okazo, spekti tiel ampleksan verkon de Kubín, estas unika.

Sed ni revenu en la kasteleton, kie ni teretage admiras la diversstilajn /realismajn, impresionismajn, kubismajn k. a./ bildojn, kiuj respegulas la artan serĉadon de la plej konvena maniero komuniki al ni la viditan mondon. Unu belaĵo apud la alia. Sed ascendinte la stuparon, oni ne plu perceptas la stilon, manieron de pentraĵoj, oni nur senspire ĝuas la nekredeblan belecon, dediĉitan de homo, kiu ne plu serĉas, ne

plu demandas, kiu trovis, scias kaj esprimas - jen homo ĝua, plezuru - tial mi kreis.

En la distanco de nur unu stacio, malantaŭ la enirejo al la Burgo, troviĝas la renovigita Rajdejo de la Praga Burgo, kie estas instalita la dua parto de bildoj, kreitaj far artpentristoj de la XXa jarcento, generacio de la naŭdekaj jaroj /realisme, impresionismo, simbolismo, secesio/. La unua parto de ilia verkaro estis ekspoziciita antaŭ unu jaro en Palaco de Hybernoj. Tiam reprezentis la cititan generacion tiuj iom pli aĝaj, kiel Marold, Uprka, Kavan, A. Slavíček k. a. La ĉi jarajn, iom pli junajn, reprezentas, inter multaj aliaj, Otakar Lebeda, kies surprize belegaj poeziaj bildoj pri nialanda pejzaĝo, sed ankaŭ pri temoj elektitaj, plej unue dum liaj studvojaĝoj en Francio kaj Italio, malhelas imagi al ni, ke kreinto de tiom da mirinde belaj artpentraĵoj, povis propramane finisian vivon estante 24-jara.

La eminentulon de ĉeĥa simbolismo, Jan Preisler, oni ne devas prezenti, ĉar nur multaj ne konas lian verkon almenaŭ de la monumentale dekorativaj surmuraj pentraĵoj, ekzemple en Komunuma Domo en Prago, kaj aliloke, alilurbe. En ĉi ekspozicio oni prezentas, inter alie, la ampleksan ciklon Nigra Lago, kie kulminas la poezia forto kaj forma koncentriĝo de la artisto.

Plej alloga ŝajnas la parto de la ekspozicio, dediĉita al Max Švabinský, kies arto, precipe la portreta kreado, estas tiel admirata kaj kiu autoris,

inter alie, la ornamaĵojn en la Nacia Memorejo - Žižkov-Prago.

Oni povas antaŭĝoĵi la aŭtune instalotan trian parton de la ciklo, kiu rilatos al la riĉflanka kreado de tiu ĉi generacio, aranĝota samloke.

Eble estus utile konsciigi, ke temas pri partoj de la preparata, daŭra ekspozicio de arto de la 20-a jarcento, instalota en bruldetruita, nun rekonstruata Foira Palaco en Prago.

Sed ni daŭrigu nian promeon kaj paŝu iomete pluen trans la Burgaj Kortoj al la Ĝeorga Monaĥejo, kie krom la daŭra ekspozicio de Malnova Ĉeĥa Arte oni instalas "Ikonojn de la 16-a ĝis 18-a jarcento el Slovakio" kaj al Palaco de Šternberkoj, kie krom la daŭra impona ekspozicio pri malnova Europa Arto de la 19-a kaj 20-a jarcentoj oni aranĝis, okaze de la fino de la Jaro de Ĉeĥa Muziko tre interesan ekspozicion "Muzika Picta". Temas pri muziko en la Europa kaj ĉeĥa pentraĵoj de la 15-a - 18-a jarcentoj. Ĝin akompanas la ekspozicio de tiamaĵ muzikiloj, kiujn oni povas kompari kun tiuj desegnitaj. La bildo, far la konata H. Veermer /17-a jc./, titolita "Instruhoro de muziko", sciigas per surskribo, lokita sur kovrilo de la spineto, ke "Muziko estas kunulino de ĝojo kaj kuracilo de doloro". Veermer ne estis la unua eĉ ne la lasta pentristo, prisorĉita per muziko. Multaj eĉ klopodis la limon inter vid- kaj aŭdsento transpaŝi, krei la muzikan estoson per koloroj, ritmo de komponado aŭ per enbildo de notoj, muzikiloj kaj aliaj muzikelementoj. La efikojn de ilia klopodo ni povas grand-skale esplori, ĉar en la ekspozicejo troviĝas bildoj kaj muzikiloj ne nur de la Praga,

Burga kaj Centrobohemia galerioj, sed ankaŭ de la Nacia Praga Muzeo, Ŝtata Scienca Biblioteko, Patrujsciencia Muzeo, Ĉefepiskopa Palaco /la du lastaj en la urbo Olomouc/, Ŝtata Kastelo kaj Galerio en la urbo Duchcov. La rezultoj imponegas.

Inter kreintoj de la ekspoziciataj verkoj troviĝas tiaj majstroj, kiel Škréta, Kupec-ký, Hals, Cranach, van Oost, Breughel, Dolci ktp.

Ke muziko de ĉiam nedisigeble apartenis al la homa vivo, nin konvinkigas jam la religiaj scenejoj, prezentataj en la bibliotekoj Olomoucká kaj Boskovická /de la urboj Olomouc kaj Boskovicé/ - fino de la 14-a jc. - kie muzikistoj estas - jen anĝeloj - jen sanktuloj.

La temo restas, nur la medioj, ludantoj kaj muzikiloj vastskale variigas, precipe sur profanaj pentraĵoj. Serĉante, ni trovas plej diversajn muzikelementojn, enkomponitajn en la pentraĵojn. Krom muziknotoj, kanto, dancado, troveblas la tuta muzikilaro, ekzemple: Vjelo, mandolino, aldeviolono, violono, hobojo, klarineto, spineto, ĉaskorno, fluto, ŝalmo, timpano kaj multaj aliaj. Same riĉe varias la ludantoj kaj aŭskultantoj, de jam menciitaj anĝeloj, sanktuloj, dioj /Kristo, Apolono, Adoniso, Venuso, Bakhuso, Pano, Orfeo, Jobo ktp./, nobelaro, homoj riĉaj, malriĉaj, urbanoj, vilaĝanoj, soldatoj, ciganoj, ktp. kaj la medioj, de paradizo, kastelaj salonegoj, bienaj ĉambroj, subsegmentoj, kortoj, gastejoj, foirejoj, ciganrestoj kaj precipe multaj belaj naturolokoj. Kaj la eternigitaj okazaĵoj? De nasko ĝis morto ĉio imagebla - amo-torturado, batalo, drinkado, dancado, negoco, pastado ktp., ĉio kaj ĉio akompanatis de muziko. Por

ankoraŭ pli konvinkigi nin pri tiu fakto, oni instalos la duan parton de la samtema ekspozicio, kiu ampleksos kreitaĵojn de la 19-a - 20-a jarcentoj.

Se al iu ne sufiĉis la priskribitaj ekspozicioj, li povis veturi al la Agnesa Monaĥejo kaj en la nepriskribeblaj belaj barokaj ekspoziciejoj admiri la ĉeĥan Pentroarton de la 19-a jarcento kaj la Artan Metion, samtempan.

Vizitinda estis ankaŭ la Centrobohemia galerio kiu prezentas al ni bildojn kaj skulptaĵojn far hispaniaj majstroj /gis la 16-a jc./.

Ni ne povas per unu fojo priskribi ĉiujn aranĝojn kaj ekspoziciojn, preparitajn por ni de niaj galerioj. Neelĉerpebla estis la propono al pragaĵoj, kulturigi per beleco. Ni ne parolu pri teatroj kaj koncertoj, ĉar tiuj tamen postulis anticipe zorgi pri biletoj, kio supozis iom da planado, ne satata de ĉiuj. Iuj preferis viziti muzeojn, ĉar diversa estas la gusto de homoj. Estis ankaŭ tiuj, kiuj ankoraŭ ne havis okazon admiri la du

novajn staciojn de nia metroo "Vltavská" kaj "Fučíkova", kie ankau troviĝas artaĵoj.

Kaj same, kiel la vizitantoj de la ekspozicioj kaj muzeoj renkontigis kun la longe forpasintaj tempoj, tiuj, kiuj supreniris la stacion "Fučíková" povis saluti la venontan ĵarmilon; ĉar la moderna ĉirkaŭo ne plu similas al nia malnova centotura urbo, sed al urbo de niaj "digitalaj, elektronikaj" posteuloj, al ni iom fremda, iom tro fantazia, kien la pli frue naskitaj ne plu apartenas.

Do, ni jam finu la vagadon tra la urbo, ni jam laciĝis pro amaso da eksterordinare valoraj vidindaĵoj. Tamen ni ankoraŭ sukcesis percepti, ke ekde la regado de Karlo la 4-a "Patro de Patrujo" oni en Prago ne finkonstruis tiom, kiom en la lastaj dek jaroj.

-ĉtr-



KRONIKO

La 20-an de januaro atingis 85 jarojn s-ano Anežka Šustrová, sindona esperantistino kaj fidela edzino de s-ano Jaroslav Šustr, iama longjara prezidanto de la Esperantista Klubo en Praha. Ni sincere gratulas!

En januaro 1985 festis sian 75-jariĝon s-ano Ladislav Kyňšl, la estinta prezidanto de la Esperantista Klubo en Praha kaj ĝisnuna aktiva funkciulo de la klubo. Gratulon!

Doc. RNDr. Vlastimil Novobilský, CSc., elstara ĉeĥa esperantisto, prezidanto de la Scienca-teknika sekcio de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, aŭtoro kaj kompilanto de priliteraturaj kaj sciencaj publikaĵoj, sinofera organizanto ekde junularaj jaroj, festis la 15-an de februaro 1985 sian kvindekjariĝon. Ĉe tiu okazo ni kore gratulas lin kaj deziras al li firman sanon kaj pluajn sukcesojn en lia aprezinda laboro.

LI ESTAS SKOTO KAJ NE ANGLO

KUNFONDINTO DE LA MODERNA LITERATURO ORIGINALE VERKITA EN ESPERANTO WILLIAM AULD SESDEKJARA /1924/.

Saluton, masonisto, mia prapatro Ruben, kiu dum tuta vivo grimpadis supren-suben, ĉizante sur preĝejoj gargojlojn kaj anĝelojn! /Komenco de la fama poemaro LA INFANA RASO/.

Mi estas skoto kaj ne anglo. Skotoj estas keltdevenaj kaj angloj /ĝenerale! / estas saksdevenaj. Iliaj kulturoj tre funde malsimilas, ĉiam akcentas William AULD. Per tiuj vortoj nia kara aŭtere klare distancis sin de la brita imperialismo kaj de ĉiuj agoj, kiuj ne plaĉas al mondo. Al ni kaj al W. AULD same ne plaĉas eĉ la lingva imperialismo, kiu proklamas la anglan por unusola lingvo internacia. Kiuj karaktertraĵoj estas simbolaj por la skotoj? Morno kaj gajo surprize kunjugataj, sens-amo, malsato al diktatoreca aŭtoritato. La amata poeto de W. AULD estas la skota poeto R. Burns. Li tradukis multon el li /Kantoj kaj poemoj/. La spirita batalo kontraŭ falsa puritaneco en seks-rilate kaj inkline al sensamo estas tipa. Pro tio ni povas diri, ke W. AULD estas homa homo, surtera homo, estas materialisto, ateisto ofte tre atakema. Kaj ni diru fiere, ke li estas ankaŭ socialisto. Do, li estas entute moderna homo kaj nature ankaŭ verkisto. Sian skotecon li fiere demonstras sur siaj antaŭuloj. Unu el miaj avinej estis denaska parolantino de la gaela lingvo. Ŝiaj gepatroj la anglan tute ne sciis. La avo de mia patro estis profesia soldato, kaj same mia avo. Mia patro grave kapvundigis en la Unua mondmilito. Li estis ano de la laborista klaso, poste inĝeniero. Li mem deklamis en koncertoj siajn propre verkitaĵojn komikajn versaĵojn. Lia talente elstaris. Mia patrino estis etburga. Do mi edukigis sub influo de du malsamaj sociaj klasoj, en opozicie kontraŭ la granda burgaro. Mian sorton destinis mia patro, skribis pri tie W. AULD al mi en letere.

Kaj lia vivo persona, okupo kaj profesio? Kiam eksplodis la Dua mondmilito, li estis liceano preskaŭ 15-jara. Fininte liceon li aliĝis volontule al la brita aer-armeo kaj fariĝis ĉasaviadila piloto /Spitfire/. De li estis konscie antifasista batalanto. Postmilito li frekventis universitaton, magistrigis pri angla literaturo kaj lingvo kaj Europa historio. Post trijara deĵoro kiel instruisto, li promociigis kaj fariĝis ĉefinstruisto. Du jarojn poste li fariĝis vicedestro de la gimnazio. Hodiaŭ li estas vicedestro de liceo, unu el la plej signifaj.

Kaj familia vivo? En 1952, post 5-jara fianĉeco, li edziĝis al filigistino, kiu sukcese laboras en tiu profesio. Ili havas filinon Judith kaj filon Roy.

Ke W. AULD estas skoto kaj ne anglo oni povas demonstri ankaŭ per fakto, ke li krom la angla funde studis francan lingvon, aliajn lingvojn por kompreni la literaturajn tekstojn. La lingvo en kiu W. AULD kreas tiel nature, kiel fiŝo fluas enakve, estas Esperanto. En ĝi li verkis siajn 28 eldonitajn verkojn /librojn/, se ni ne kalkulas amason da artikoloj, el kiuj naskiĝas novaj libroj. Li regas Esperanton tiel flue kaj nature kaj ĝisfunde kiel la anglan. Li eklernis la lingvon en la jaro 1937 /de 47-jara praktikado! kaj funde edukigis en ĝi ekde 1947 /de 37 jarojn!/. En la E-movado internacie li okupis preskaŭ ĉiujn signifajn funkciojn kaj postenojn. Ekde la Profesoro de la someraj universitataj kursoj en la Ŝtata Universitato de Sanfrancisko ĝis posteno de la redaktoro de la literatura revuo FONTO, kiun li redaktas jam la kvaran jaron kaj kiu eldoniĝas en Brazilo.

En la jaro 1950 li travivis krizon pri la problemoj, ĉu fariĝi angle aŭ Esperante verkanta aŭtoro. Li elektis Esperanton. Mi demandis: Pro kio? La situacio de originale verkanta aŭtoro ne estas certa. Esperantistoj ĝis nun ne kapablas nutri siajn verkatajn aŭtorojn. Motivoj estas du. Unua: li havas sian profesion, kie li estas sufiĉe bone pagita kaj due: esti Esperante verkanta aŭtoro oni ne havas tiom da konkurantoj kiel en la angla. Se W. AULD estas talentita aŭtoro, se li regas perfekte la lingvon, li pensas, ke Esperanto bezonas alian talenton pli ol la angla literaturo, kie talentitaj kaj influaj aŭtoroj ne mankas. Ĉu li ne bedaŭras sian decidon? Ne. "Miaj libroj estas legataj tra la tuta mondo kaj sentraĵo. Do mi parolas direkte al miaj legantoj. Ili estas legataj en tiuj landoj, kien ili apenaŭ penetras se ili estis angle verkitaj", diris li.

Kaj ĉu vi ne estas fremdulo en via propra familio, ĉu viaj familianoj povas legi kion vi verkis? "Mia edzino scipovas Esperanton kaj ŝi ofte akompanas min eksterlanden". Pri la infanoj li jam ne diris tion. Kaj literaturo? Ĉu W. AULD ne eskapis for de la angla timanto nur la konkurado de siaj angle verkantaj kolegoj? Ĉu li ne kaŝis sin antaŭ la batalo, serĉante pli trankvilan etoson de la esperantistaro al kiu mankas ankoraŭ geniuloj kiel W. Shakespeare? Ne. Male.

Kiu sukcesis eldoni /kaj ne nur verki/ preskaŭ 30 verkojn /kaj inter ili estas verkoj kun pli da paĝoj ol 500/, tiu jam talentas. Lian verkadon ni entute statistike povas klasifiki en poemaroj /6/, antologioj /Esperanta kaj skota kaj angla kaj antologie el verkoj premiitaj en Belartaj konkursoj /4/, eseoj /5/ ĉefe prilingvaj kaj priliteraturaj, tradukaĵoj /8/ kaj inter ili tiuj de La sonetoj de Shakespeare, kantaroj /3/. Ege signifaj estas liaj lernolibroj /3/. Tiuj lernolibroj eldoniĝas en multaj naciaj eldonoj /sveda, germana/.

Kiun eĉon havas lia verkado en naciaj literaturoj? Ĉu ekzistas nacilingvaj tradukoj de liaj originale verkitaj libroj? Nekalkuleblaj tradukoj jam aperis /angla, franca, nederlanda, itala, hungara, dana, rumana, hebrea, japana ktp./. Nun oni preparas la nederlandan tradukon de LA INFANA RASO, jam pretas la portugala traduko. Multon oni tradukis en la skotan. Nature, ke en la ĉeĥa kaj slovaka lingvoj ekzistas ankoraŭ nenio. Ni tro emfazas pri nia progresiveco kaj moderneco, sed en la

praktiko multe mankas al vi. Do, vivu la kungemiaj tradukantoj de la verkoj far William AULD en la ĉeĥan kaj slovakon. Sed traduki la poezie talentitan verkon oni ne povas facile. Oni devas trapaŭti la verkon kaj kiu dediĉos sian verkon al tio kaj kiu eldonos ĝin.

Ni citu iom pesimisman fragmenton el lia verko:
... kaj ni alian solvon ne trovas ol... forkuri en dogmojn, superstiĉojn, kruelojn kaj doloron kaj sklave ni diigas, ni Kriston aŭ Laboron.
... ni rigardu iom la faktojn: tria milito dum nia jarcento estas neevitebla...

Ĉu eraras William AULD ol eraros ni?

Sanon, energion kaj amon de viaj admirantoj okaze de via 60 - jariĝo!

J. Karen

la fame konata ĉeĥa esperantistino, verkistino kaj tradukistino, elstara profesia aktorino Eva Seemanová ĝisvivis la 21an de marto sian 65-an naskiĝtagon. Ŝi estis fondintino de la teatra trupo "Verda Ĉaro de Julio Baghy", kies prezento de "Pigmaliono" de G.G. Shaw vekis grandan intereson dum 44a UK en Varsovio en 1959. Eva Seemanová /tiam konata kiel Suchardová/ ne nur esperantigis la dramon, ŝi tiam mem aktoris la ĉefan rolon de Liza Doolittle. Ni ĉiam ĝojas, kiam ni povas vidi ŝin en iu nova dramo. Por ŝia plua poresperanta laborado ni deziras al ŝi multajn sukcesojn kaj firman sanon!

- red-

P R A G O

Dum la plenkunsido de Urba Packonsilantaro en Prago, okazinta la 17-an de januaro 1985, ties prezidanto prof. d-ro Zdeněk Souček, DrSc, publike dankis al la membroj de Esperantista Klubo en Prago por ilia perpaca laboro.

Esperantista Klubo en Prago sendis 300 kronojn al la Fonduso de Solidareco, por helpi la malsatantan Afrikon.

-ŝtr-

P R O S T Ě J O V

En oktobro aranĝis loka grupe jam tradician ekspozicion de E-korespondajfoj, kiun rigardis pli ol kvin cent vizitantoj, el ili ĉirkaŭ kvindek eksterlandanoj. Kiel interesajfoj estis montritaj libroj kaj broŝuroj el fremdlande, kiel specialajfoj Bible kaj Nobla Kerano.

Poŝte komenciĝis kursoj por komencantoj kaj per progresintoj.

-tom-

Ú S T Í N A D L A B E M

Esperanto-rondeto ĉe ODKP en Ústí nad Labem okazigis en kadre de sia novembro monatkunveno prelegon de la Praga poeto Jiří Karen pri ĉeĥa poezio kaj pri lia nova poemaro "Arboj venas urban" kun ekologia temaro.

La poeto legis la ĉeĥajn originalojn kaj Jiří Kořínek siajn Esperanto-tradukojn de la samaj poemoj. Poŝte Jiří Karen klarigis principojn de moderna poezio kaj sekvis diskuton kun la ĉeestantoj. La vespero estis interesveka kaj sukcesa.

La 12-an de decembre 1984 okazigis nia E-rondeto la tradician ZAMENHOF-tagan kultuvesperon. En la jarfin-solenaĵe ornamita klubejo per kandeloj kaj picebrancetoj la lokaj esperantistoj kaj gastoj el najbaraĵoj /kaj eĉ el Prago/ povis ĝui altnivelan programon. Malfermis ĝin s-ano M. Smyčka, solisto de la loka ŝtata operteatro, per la Praga sub la Verda Standardo far L. L. ZAMENHOF. Post kurtaj skizoj pri la vivo de d-ro ZAMENHOF far J. Kořínek prezentis Miroslav Smyčka kun pianakompano far korepeditore Karel Hiner la Bibliajn Kantojn kaj Largon el Novmonda Simfonio de Antonín Dvořák kaj Ave Maria de Franz Schubert en Esp. tradukoj de J. Kořínek. La artisme altnivela prezento rikoltis aprezan aplaudon. Poemon de la ĵus Nobel-premiita nacia artisto Jaroslav Seifert en traduko de J. Kořínek prezentis 4 kursaninoj. Sekvis kolektiva kantado de ĉeĥaj popolaj pastoreloj en traduko de J. Kořínek laŭ disdonitaj tekstoj. La belan programon finis s-ano V. Vane jun. per siaj profesie perfektaj kaj mirigaj magiaĵoj. Kafo au teo kun kristnask-festaj sukerajfoj agrabligis la vesperon, kiun ĉi-foje pro gripe ne povis ĉeesti la prezidanto kaj kelkaj rondetanoj.

-JK-



KMP v Habrech byl založen v říjnu r. 1981. Měl 15 členů - žáků 8. a 9. tříd. Členové KMP se učili esperanto podle učebnice Th. Kiliána. Po absolvování 10. lekce si začali dopisovat s esperantisty z cizích zemí. Výuka však trvala pouze 1 rok. V červnu 1981 všichni členové KMP ukončili školní docházku.

V dalším školním roce jsme získali 25 členů, tentokrát ve věku od 9 do 14 let. Začali jsme vyučovat podle nově vydané učebnice L. Prachaře. Navázali jsme kontakty se zahraničními esperantisty - členové našeho KMP si dopisují do Anglie, BLR, MLR, PLR, SSSR... Po absolvování 19. lekce učebnice skládají naši mladí esperantisté začátečnickou zkoušku. Členy zkušební komise jsou členové EK Havlíčkův Brod, s nimiž má náš KMP od svého založení velice dobrou spolupráci.

V současné době má KMP v Habrech 31 členů. Jedenáct začátečníků se připravuje ke zkoušce, 20 dětí pokračuje ve výuce podle učebnice Th. Kiliána ABC.

Loni se 11 pionýrů-esperantistů zúčastnilo Letního esperantského tábora v Lančově. V letošním roce se na 3. bñ tohoto tábora chystá 20 mladých esperantistů.

Jana Kotšrová

Havlíčkův Brod. V souvislosti s ukončením činnosti ZK ČSD Havl. Brod získal esperantský kroužek nového zřizovatele, kterým se stal ZV ROH ŽST Havlíčkův Brod. Výroční členská schůze 30.11.1984 schválila úpravu názvu na Esperantský kroužek Havlíčkův Brod a zvolila nového předsedu, kterým se stal s-ano František Dvořák, pracovník železniční stanice. 29.10.1984 byl zahájen kurs esperanta v Domě mládeže Odborného učiliště v Havlíčkově Brodě. Počet vyučovaných je 15, vyučuje s-ano J. Žák. Místo schůzek členů kroužku bylo přemístěno do výpravní budovy železniční stanice Havl. Brod, čis. dveří 46. K 29.12.1984 odeslal kroužek členské příspěvky na rok 1985. Nová adresa pro korespondenci: Esperantský kroužek Havlíčkův Brod, Jaroslav Žák, U stadionu 2359/15, 580 01 Havlíčkův Brod.

L. Železný

La titolo aludita formulo apartenas al la Ĥemia kombinaĵo, kiu oni emus nomi "osmia kvaroksido" /J. Werner, STARTO, 1981, 5, 22/. Tamen, tiu nomo vekus pravan dubon, ĉu esperantistoj ĉiam celkonscie strebas al internacie kodigitaj terminoj.

Konsultante plurlingvan Ĥemivortaron /ekz. E. Votoček, Chemický slovník, 1952, 160/, oni trovas, ke nacilingvaj nomoj de la koncerna oksido, bone utiligeblaj per normigita internacia nomenklature, jenas:

angle: osmium TETRoxide, france: TÉTRoxyde d'osmium, germane: OsmiumTETRoxyd, itale: TETRossido di osmio.

Aliflanke, apenau utilus jenaj nomoj:

angle: perosmic acid, ĉeĥe: kysličník osmičelý, france: peroxyde d'osmium, germane: Übersmiumsäureanhydrid, latine: acidum /hyper/osmium, osminicum.

Revenante al la kvar ekzemploj prezentitaj pli supre, ni devas koncedi, ke ilia komuna denominatoro estas ŝuldata al la vertere TETR- /el la greka numeralo TÉTTARES, prefikse TÉTRA-/. Cetere, la grekaj numeraloj internacie akceptiĝis per la kombinaĵoj, ĉu el la Ĥemio neorganika /ekz. karbon-Dioksido/, ĉu organika /ekz. MONOĥlorbenzene/. Evidente, ankau okaze de la osmia oksido, nacilingvo ne provas apliki sian propran numeralon KVAR /angle: four, ĉeĥe: čtyři, france: quatre, germane: vier/. Kial? Tial, ke la Ĥemiistoj agnoskis la senduban internaciecon de la greka vorto, internaciecon tre dezirindan en la sfero nomenklatura.

La sama precedo devus esti memkomprena ankaŭ por Esperanto, kiu nepre deziras prezenti al la Ĥemiista publike ne enigman, sed unuavide rekoneblan nomenklaturon.

De, Os04 nomigu OSMIA TETROKSIDO /osmi- tetroksido, tetroksido de osmie/, ne "kvaroksido".

J. Kavka

anoncoj

ESPERANTISTA VEGETARANO -
předplatné na rok 1985 ve výši 40,-
Kčs přijímá Arnošt Vána, 962 71 Du-
dince 163

NOVAN BROŝURON en la internacia lin-
gvo Esperanto eldonis Norvega Ŝta-
ta Fervojo (Norges Statsbaner) In-
formasjonskontoret. Storgaten 33.
0184 OSLO 1. La titolo estas: Voj-
gu kum goĵo per Norvega Ŝtata Fer-
vojo. Lau peto al la eldoninto oni
senpage ricevas ĝin.

La Fervojmuzeo en la norvega urbo
Hamar eldonis broŝuron kum teksto
en kvar lingvoj: norvega, angla,
germana kaj en Esperanto.
Bedaŭrinde oni ne evitis preser-
on: la muzeo dumvintre estas ferm-
ata dum dimanĉoj, sed en la broŝu-
ro estas menciita la malo. Tiuj
kiuj deziras la broŝuron, skribu
al: Jernbanemuseet. Postboks 248.
N-2301 Hamar, Norvegujo. Oni sen-
das la broŝuron senpage.

el fervojista movado

MOSKVO SOLVAS PROBLEMOJN DE LA
FERVOJA TRAFIKO -ELKRESKOS NO-
VA FERVOJSTACIO!

Moskva fervoja nodo aparte-
nas al la plej grandaj fervoj-
nodoj. Tamen ĝiaj ĉiuj fervojaj
stacioj jam ne sufiĉas al la
rapida evoluo de la urbejo kaj
por plialtiganta nombro de la
pasageroj, ĉiutage alveturan-
taj al soveta ĉefurbo. Oni jam
akceptis decidon konstrui la
dekan fervojstacion.

La sama situacio estas an-
kaŭ sur fervojlinioj en ĉir-
kaŭaĵo de Moskvo kaj sur ali-
aj ĉefaj linioj. Kiamaniere
plialtigi trafikkapablon de la
jam nun maksimume ekspluatata
fervojreto? Kiel oni sukcese
provis, unu el novaj vojoj es-
tos formate de pasagertrajnoj
kun 24 ĝis 36 vagonoj. Temas
pri analogio de "dekmiltunaj"
vartrajnoj, kiuj je unu fojo
transportos pli multe da varo.

Tiom longaj trajnoj tamen
estus nepraktikaj por pasaĝe-
roj dum serĉado de la destini-
ta vagono sur la perono. Tial
el ĉiuj grandaj moskvaj staci-
oj plu forveturados maksimume
dekkvinvagonaj unuoj, kiuj es-
tos sur rando de la urbo kuni-
gataj en vagonarojn kun 24 aŭ
36 vagonoj.

Ekzemple jam nuntempe for-
veturas el Moskva Leningrada
stacio multaj trajnoj en kvin-
minutaj intervaloj, poste ili
estas kunigataj kaj antaŭ la
fina stacio en Leningrad estas
tiuj ĉi multvagonaj trajnoj
denove disdividataj.

Unu el modernaj instalaĵoj
sur periferio de Moskvo, kie
oni kunigos la trajnojn, estos
nove konstruita, jam la deka

moskva stacio. Oni konstruos
ĝin en la sudokcidenta parto
de la urbo en kvartalo Bity-
Kalinino. La komplekso estos
kompletigota per hotelo, gran-
da magazeno, subteraj garagoj
kaj parkejoj. La urba amastraf-
fiko, precipe autobusa, havos
siajn haltejojn en unu el la
subteraj etaĝoj, en la sama ni-
velo kiel ŝtacidomaj haloj. Du
placoj antaŭ stacidomo estos
kunligotaj per subteraj tune-
loj por automobilistoj kaj por
piedirantoj.

La konstruoplanoj estas jam
finpretigitaj kaj konstrulabo-
rojn oni komencos jam ĉi-jare.

LA VERDA POR MULTMILTUNAJ
TRAJNOJ

Antaŭ pli ol kvar jaroj al-
veturis en destinitan fervoj-
stacion la unua vartrajno kun
suma tunkvanto dekmil tunojn.
La rekordan trajnon tiam ĝvi-
dis al celstacio lokomotivest-
ro V. Sokolov, nuntempe duobla
heroo de la socialisma laboro
el lokomotivdeponejo Moskvo-
Sortirovoĉnaja. Li baldau tre-
vis multajn sekvantojn, kiuj
ripetis ĉe superis lian labor-
rezultojn.

Antaŭ kelkaj monatoj ape-
rigis soveta gazetaro infor-
mon pri plua venko de la re-
kordo. La novan sukceson atin-
gis fervojistoj en Siberio, ki-
uj ne timis veturi kun trajno
pli ol kvin kilometrojn longa
kaj preskaŭ tridekmiltuna.

Kuraĝaj eksperimentoj kun
altigado de tunkvanto de la
vartrajnoj havis de la komenco
nenion komunan kun ŝajne mem-
cela strebado de plenmano da
unuopuloj atingi bonfamon aŭ

superi rekordojn. Multaj gravaj fervojlinioj, precipe en europa parto de Sovetunio, sed ankaŭ en vastaj ĉirkauregionoj de la gravaj ekonomiaj centroj en Siberio kaj Malproksima Oriento estas nuntempe jam maksimume ekspluatataj. Tial oni serĉas rezervojn ebligantaj pliigi ilian trafikeblecon sen pluaj altaj investaĵoj. La pretendaj provoj unusene pruvus preferojn de la unu dekmiltuna trajno antaŭ kvin dumiltunaj veturantaĵoj unu post la alia.

La nuntempaj sovetiaj normoj rekomendas kiel optimumaj kvarmiltunajn trajnojn. Sed praktike vartrajnoj en Sovetunio atingas proksimuman pezon malpli ol trimil tunojn, kie multobligas pretendojn pri nombro de lokomotivoj kaj ilia priservo, pri laboro de staciaj kaj liniaj gvidtrafikaj laborantoj. Laŭ modelo de moskva fervojistoj oni nuntempe jam en multaj partoj de la lando ordinare ekspedas okmil-, dekmil- eĉ pliimiltunajn trajnojn. Sed praktiki tiun ĉi progresivan, altefikan metodon en transporto tute ne estas tiom facila, kiel oni povus

supozi. Unue tiom longaj trajnoj ne povas enveturi sur flanktrakojn per preterpasigi alian similan trajnon. Tial oni devas pasigi la tutan distancon inter ekspedisto kaj celstacio praktike sen haltado. La trafikgvidantaj laborantoj devas por tiuj ĉi vareksprestrajnoj prepari kaj garantiĝi veturpermeson sur la tuta linio. La altaj pretendoj estas postulataj ankaŭ de lokomotivistoj kaj iliaj helpantoj. Oni ja nefacile povas eĉ pripensi, kiom da energio bezonas altpova elektra lokomotivo por ekveturigi tiom tunenhavan trajnon. Lokomotivestroj devas tre bone koni profilon de la tuta linio, ĉar bremsi por haltigi tian kologon estas eĉ pli komplika ol ĝin ekveturigi. Pli oftaj haltigoj aŭ nur pli intensivaj ŝanĝoj de rapideco de la tuta kelkkilometra trajno karakterize malaltigas grandan ekonomian efektan de transporto de tiuj ĉi multmiltunaj kaj superlongaj trajnoj.

J. Tomíšek

ni funebras

Ni anoncas al ĉiuj geamikoj de esperanto, ke la 3-an de februaro 1985 forpasis nia bonega samideano František Březina, fondinto de la Esperanta movado en Žďár nad Sázavou kaj en ĝia ĉirkaŭaĵo. Li estis longjara prezidanto de esperantista rondeto, eminenta Esperanto-instruisto kaj precipe bonega homo. Li mortis en Prago 73 jarojn aĝa. Honoron al lia memoro.

La 10-an de januaro 1985 mortis elstara ĉeĥa operkantisto nacia artisto Beno Blachut /blahut/, laureato de ŝtata premio. Li estis granda persono de la ĉeĥa muzik-drama arto, eble la plej elstara ĉeĥa tenoristo. Li naskiĝis la 14-an de junio 1913 en Ostrava-Vítkovice kaj en la tisa ferfabriko li eklaboris kiel kaldronisto. Sed baldaŭ li dediĉis sin plene al profesia kantado. Ekde 1939 li kantis en operejo de Olomouc, ekde 1941 kiel solisto en la Nacia Teatro en Prago. En la jaro 1963 li estis nomumita nacia artisto. Li havis rilaton ankaŭ al Esperanto, ĉar li partoprenis la artajn elsendojn de la ĉeĥoslovaka radio en la Internacia Lingvo. Ekz. en la jaro 1950 (la 5-an kaj 12-an de aprilo) li kantis princon en la esperantlingva prezento de opero "Najado" de Antonín Dvořák.

**Český esperantský svaz
110 01 PRAHA 1, Jilská 10**

NOVINY

**Dohlédací pošta Praha 07
Snížený poštovní poplatek povolen
Ředitelstvím pošt Praha
J. ZN. P/1-1267/79 ze dne 6. 4. 1979**